Alicio nenion respondis. Neniam en la vivo oni tiom kontraŭdiris al ŝi, kaj ŝi konsciis ke rapide ŝi perdas la paciencon. "Do vi estas jam nun kontenta?" diris la Raŭpo.

"Ne, sinjoro" diris Alicio; "mi ŝatus esti iomete pli granda, se al vi ne malplaĉas, ĉar ok centimetroj estas ja alteco tute bizara."

"Tre *bona* alteco" interrompis kolere la Raŭpo, kaj ĉe la diro starigis sin vertikale. (Ĝi havis precize ok centimetrojn!)

—"Sed por mi ja ne kutima" plendis la kompatinda etulino.

Kaj ŝi pensis en si: "Se nur la bestoj kaj birdoj ne estus tiel ofendiĝemaj!"

"Vi alkutimiĝos post kelka tempo" diris la Raŭpo, kaj enbuŝiginte la pipon, ĝi denove ekfumis.

Ĉi tiun fojon Alicio pacience atendis ĝis ĝi reparolos memvole. Post unu, du minutoj la Raŭpo demetis la pipon kaj skuis sin. Tiam, derampinte de la fungo, ĝi rampis for en la herbon, kaj, rampante, ĵetis post si la rimarkon:

"Unu flanko igos vin kreski, la alia malkreskigos."

Ĉi tion kaj nenion plu! "Unu flanko de *kio*, alia flanko de *kio*" pensis en si Alicio.

La Raŭpo tuj respondis al ŝia *penso*, dirante "De la fungo," kaj post unu momento malaperis.



Alicio restis senmova kaj zo
fungon, penante eltrovi kie
"flankoj," kaj ĉar ĝi estis plen
tiun problemon tre malfacila.
la brakojn ĉirkaŭ la fungon, kaj
forrompis unu peceton.

"Kaj nun kiu estas 'unu' k
diris ŝi mordetante la dekstra
provi la efikon.

En sama momento ŝi sentis
sub la mentono. (Ĝi frapis la p

Tiu subita ŝanĝo tre timigis
dante ke ŝi nepre ne devas perd
klopodis por manĝi iom de
peceto. La mentono kaj la pi
kunpremiĝis, ke apenaŭ ŝi pov
buŝon, sed fine prosperis al ŝi
erojn de la maldekstra peceto.

* * * *
* * *

"Bone! Jam mia kapo liberiĝ
ĝojigite. Sed la ĝojo tuj ŝan
kiam ŝi rimarkis ke la ŝultroj
rigardante, ŝi povis vidi nur gr
da kolo, kiu ŝajne kreskas el ia
folioj tre malproksime de ŝiaj ol

"Kio en la tuta mondo estas
diris Alicio, "kaj kien malap
Kaj vi, ho, kompatindaj manoj,

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEI